

# Vorto de Homo - Vorto de Dio - Vorto de Saĝeco

Mormona teologio pritraktas tiujn diversajn temojn, kiel la naturo de la ĉielo, kaj la malbonaj de alkoholo. Fakte, en la filozofio de tiu ĉi sistemo, la du havas proksimajn interrilatojn. Niaj Korpoj estas sanktaj. Dio kreis homon laŭ sia bildo. La homa forto devas esti uzata por la plibonigo de lia stato kaj ankaŭ por la plibonigo de liaj kunuloj kaj ĉirkaŭaĵoj. Lia korpo estas la tabernaklo de la spirito kaj leviĝos kun li en la releviĝo. Jen tri artikoloj pri la temo de La Vorto de Saĝeco - t.e. la leĝo pri korpa sano. Unue vi legos artikolon de bulgara esperantisto laŭ praktika vidpunkto. Due, vi legos la revelacion donitan al Jozefo Smith en la jaro 1833, pli ol cent jaroj antaŭ ol la homoj komenciĝis serioze maltrankviliĝi pri la malbonaj efikoj de danĝeraj substancoj. Trie, vi aplikos vian konon pri La Vorto de Saĝeco per internacia restoracia kvizo. Dum vi kompletigos la kvizon, vi pripensu tion, ĉu la proponitaj pladoj estas konsumendaj laŭ revelacio nomita La Vorto de Saĝeco.

## Malutilaj kutimoj

(represita el Bulgara Esperantisto, 1990)

Pri kio temas? Pri la grandega socia malutilo - tobakfumado kaj konsumado de alkoholaĵoj.

Mi skribis tiujn liniojn ne por altiri la atenton de fumantoj kaj drinkantoj. Ili ne ŝatas legi similajn materialojn, ĉar ili el propra sperto komprenas la malutilon de la tabakfumado kaj drinkado. Al ili mankas ne tiurilataj konoj, ĉar sur sia propra dorso ili spertas ĉiujn bonaĵojn, kiuj venas rezulte de tiuj danĝeraj kutimoj. Ili pli bone al la ceteraj per personoj scias, kiom kostas al ili tiuj pereigaj ĝuoj. Al ili simple mankas volo rezigni la tabakon kaj alkoholon, venki tiujn kutimojn. Ja kiu pretas deklari sin ulo kun malforta volo? Ne malofte tiuj uloj estas personoj kun grava socia posteno: administraj kaj ekonomiaj agantoj, komsomolaj, kaj aliaj sociaj funkciulo, gepatroj, instruistoj, ĵurnalistoj, kaj kuracistoj - personoj, kiuj devas prezenti pozitivan ekzemplon. Tre malofte oni povas aŭdi de ili iun memkritikan vorton: ja ili devas gardi sin aŭtoritaton! Ili por tiu celo havas milojn da teorioj pri utilo de tabakfumado kaj de drinkado. Tial geknaboj jam en tre frua aĝo (eĉ 12-jaruloj), por pruvigi sian virecon, la knabinoj - sian emancipiĝon - demonstracie fumas kaj drinkas en publikaj lokoj prefere fortajn, prestiĝajn alkoholaĵojn, kvankam tio nepre reflektiĝas sur ilia sano kaj la buĝeto de la gepatro aŭ sur iliaj stipendioj. La intelektuloj (instruistoj, teknikistoj, inĝenieroj, ĵurnalistoj, verkistoj, poetoj k.s.) tute serioze pravas, ke la fumado kaj la drinkado helpas al ili malaltigi la mensan streĉitecon kaj donas al ties intelekta laboro plian stimolon... Kontraŭe, la laboristoj, plenumantaj pezan, ne mekanikigitan laboron, ordinare ripozas po dek minutoj ĉiuhore, fumante cigaredon por vigligi sin. Ĉiuj ĉi herooj de la cigaredo kaj de la alkohola glaso ŝatas rakonti ĉu realajn, ĉu elpensitajn historietojn pri konataj maljunuloj, drinkantaj dum sia tuta vivo, tamen ĝisvivintaj altan aĝon kompare kun aliaj, kiuj nek fumas, nek drinkis, sed porpasis en pli juna aĝo... Kompreneble, al similaj fabeloj la scienco delonge donis tute racian klarigon.

La Scienca Instituto pri Onkologio en Sofio, kiel ankaŭ aliaj similaj institutoj en eksterlando, konstatas, ke senĉese plimultiĝas la kazoj de tumoro de la supraj spirvojoj. Konsiderinda parto de ili prezentas kanceron. En nia lando ĉiujare malsaniĝas je la cititaj malsanoj ĉ. 3400 personoj, el kiuj 1600 estas kancere malsanaj. Tre signifoplena estas la fako, ke en la pasinteco tiuj personoj kutime estis 50-jaruloj, eĉ pli aĝaj, kaj nun la meza aĝo de la trafitaj de tiu malsano estas 25-50 jaroj. Tre maltrankviliga estas ankaŭ tio, ke antaŭe inter ĉiuj 25-30 malsanaj viroj estis nur unu malsana virino, kaj nun - inter nur 15-18 malsanaj viroj.

La plej ofta kaŭzo de tiuj malsaniĝoj estas la tabakfumado kaj la drinkado, kiuj malbone efikas ne nur sur la fumantoj kaj la drinkantoj mem, sed ankaŭ sur la personoj, kun kiuj ili loĝas aŭ laboras en komuna ejo.

Se ni farus kalkulon por periodo de dek jaroj, ni konstatos, ke novaj 34-mil personoj malsaniĝos pro tumoroj kaj kancero. Krom la personaj suferoj kaj tragedioj, kiom da objektivaj malfavoraj konsekvencoj fontas el tio!

Oni devas pligrandigi la elspezojn de la ŝato por konstruado de novaj malsanulejoj kun multekosta aparataro kaj specialigita personaro. Forlasas la vicojn de la laborkapablaj homoj miloj da laboruloj en sia plej produktiva aĝo. La ŝtata buĝeto ŝarĝas sin per aldonaj elspezoj por pensioj. Se oni kalkulus nur po dek minutojn por fumado de minimume dek cigaredoj dum unu labortago, oni konstatus perdon de plena laborhorro, kio malbone reflektas sur la produktiveco de la laboro en la entreprenoj. Se oni kalkulus en la skalo de la tuta lando, oni povus konstati, de estas misuzataj milionoj da laborhorroj ĉiutage.

Pro la uzado de alkoholaĵoj kreskas la nombro de krimoj, de aŭtokatastrofoj, nombro de mortigitoj aŭ kripligitoj, de huliganaĵoj k.a. Ankaŭ ĉikaze la statistiko prezentas terurajn ciferojn. Kaj por la kuracado, administra personaro, juĝista aparato, milico ankaŭ estas necesaj ne malmultaj financaj rimedoj.

La bildo, kiun mi prezentas surbaze de sciencaj esploroj, estas tamen ne plena. Sed eĉ tia, ĝi povas pensigi ĉiun patrioton.

Tial la konscienca partopreno en la batalo por elimino de la kaŭzoj de tabakfumado kaj konsumado de alkoholaĵoj estas grava tasko de ĉiu civitano de nia lando.

Al nia socio pli decas sobra vivmaniero ol simila amasa fiuzo de ĉiuflanke kaj rekte malutilaj produktoj, kiaj estas la tabako kaj la alkoholo en ĉiuj iliaj formoj.

La esperantistaro ne manku inter la konsciaj batalantoj por sana vivmaniero.

N. Bogdanov

## Sekcio 89, Doktrino kaj Interligoj

Revelacio donita per Jozefo Smith la Profeto, ĉe Kirtlando, Ohio, la 27an de februaro, 1833, konata kiel la Vorto de Saĝeco. - Abstino de vino, fortaj drinkaĵoj, tabako, kaj varmaj trinkaĵoj ordonita - Modera konsumado de viandaĵo - Sanaj manĝaĵoj - Promesoj al tiuj, kiuj vivas laŭ ĉi tiuj principoj.

1. Vorto de Saĝeco, por la bono de la Konsilantaro de Altaj Pastroj, renkontiĝinta en Kirtlando, kaj la Eklezio, kaj ankaŭ la sanktuloj en Ciono -
2. Ke saluto estu sendita; nek por ordono nek per devigo, sed per revelacio kaj la vorto de saĝeco, elmontrante la ordon kaj la volon de Dio pri la surtera savo de ĉiuj sanktuloj en la lastaj tagoj -
3. Donita por principo kun promeso, adaptita al la kapableco de la malfortuloj kaj la pli malfortaj de ĉiuj sanktuloj, kiuj estas aŭ povas esti nomitaj sanktuloj.
4. Jen, vere, tiel diras la Sinjoro al vi: Pro la malvirtaĵoj kaj trompoj, kiuj ekzistas kaj ekzistos en la koroj de konspirantaj homoj en la lastaj tagoj, Mi avertis vin, kaj antaŭvertas vin, donante al vi ĉi tiun vorton de saĝeco per revelacio -
5. Se iu ajn homo el inter vi trinkas vinon aŭ fortan drinkaĵon, jen ĝi ne estas bona, nek akceptinda en la okuloj de via Patro, nur kiam vi renkontiĝas por oferedoni viajn sakramentojn antaŭ Li.
6. Kaj, jen, tiu devas esti vino, jes, pura vino el al vinbero, sed por la vinberarbedo, kaj el via propra faritaĵo.
7. Kaj, denove, fortaj drinkaĵoj ne estas por la stomako, sed por la lavado de korpoj.
8. Kaj, denove, tabako ne estas por la korpo, nek por la stomako, kaj ne estas bona por la homo, sed estas herbo por kontuzoj kaj por ĉiuj malsanaj bovoj, ĝi estu uzata kun prijuĝo kaj kapableco.
9. Kaj denove, varmaj trinkaĵoj ne estas por la korpo nek stomako.
10. Kaj denove, vere mi diras al vi, ĉiujn bonajn herbojn Dio ordinis por la konstitucio, naturo kaj uzo de la homo -
11. Ĉiu herbo en ĝia sezono, kaj ĉiu frukto en ĝia sezono; ĉiuj ĉi estu uzataj kun prudento kaj dankado.
12. Jes, viandaĵon kaj de bestoj kaj de birdoj de la aero, Mi, la Sinjoro, ordinis por la uzo de la homo kun dankodonado; tamen ili estu uzataj ŝpare;
13. Kaj ĝi plaĉas al mi, ke ili estu uzataj, nur en tempoj de vintro, aŭ malvarmo, aŭ malsatego.
14. Ĉiuj grajnoj estas ordinitaj por la uzo de la homo kaj de bestoj, por esti la bastono de vivo, ne nur por la homo, sed ankaŭ por la bestoj de la kampo, kaj la birdoj de la ĉielo, kaj ĉiuj sovaĝaj bestoj, kiuj kuras aŭ rampas sur la tero.
15. Kaj tiujn ĉi Dio kreis por la uzo de la homo nur en tempoj de malsatego aŭ troa malsato.
16. Ĉiu grano esta bona por la manĝaĵo de la homo; kiel ankaŭ la frukto de la vito, ĉu un la grundo ĉu super la grundo -
17. Tamen, tritiko por la homo, kaj maizo por la bovo, kaj aveno por la ĉevalo, kaj sekalo por la birdoj kaj por porkoj, kaj por ĉiuj utilaj bestoj, kiel ankaŭ aliaj grajnoj.

18. Kaj ĉiuj sanktuloj, kiuj rememoras gardi kaj fari ĉi tiujn diraĵojn, marŝante en obeado al la ordonoj, ricevos sanon en ilian umbilikon kaj medolo en iliajn ostojn;
19. Kaj ili trovos saĝecon kaj grandajn trezorojn de kono, eĉ kaŝitajn trezorojn;
20. Kaj ili kuros kaj ne laciĝos, kaj marŝos kaj ne svenos;
21. Kaj Mi, la Sinjoro donas al ili promeson, ke la detrua anĝelo preterpasos ilin, kiel la infanojn de Izrael, kaj ne mortigos ilin. Amen.

Noto de la redakcio: Varmaj trinkaĵoj estas difinitaj esti kafo kaj teo. Fortaj drinkaĵoj inkluzivas ĉiujn alkoholaĵojn. Nuntempe akvo estas uzata por la sakramento.

## Kvizo pri Internacia Menuo

La Ekzota Restoracio en Verdurbo, kiel ĝia nomo indikas, proponas al siaj klientoj kun tre rafinita gusto, la plej palat-tiklajn manĝaĵojn el foraj regionoj de la mondo. Tiu ĉi dek-demanda kvizo ekzamenos vin rilate vian gastronomian scion. Jen dek difinoj ĉerpitaj el la restoracia manĝokarto. Ĉu vi scias, kiel nomiĝas la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj en Esperanto? Bonan apetiton!

### Supoj

- a. Rusa acideta supo el betoj
- b. Provenca supo el rokfiŝoj, prezentita kun safranaj pantranĉaĵoj kaj ajlolea saŭco

### Ĉefpladoj

- c. Hinda manĝaĵo, konsistanta el kokido kaj spicitaĵoj per pulvorigita pimento kaj kurkumo
- ĉ. Araba manĝaĵo, preparita per milio kaj raguo el ŝafviando
- d. Orienta manĝo el rizo bolita en akvo, miksitita kun ruĝa pipro kaj rostita viando kokina, porka aŭ ŝafa
- e. En Japanio, fiŝoj, salikokoj, legomoj, frititaj en pastaĵo

### Deserto

- f. Konfitaĵo el bakita miksaĵo de amelfaruno, sezama aŭ sunflora oleo kaj sukero

### Trinkaĵoj

- g. Fermentinta acida ĉevalina lakto

### Drinkaĝo

- h. Orienta brando, distilita aŭ el kokoso, aŭ el fermentinta rizo

### Respondoj

- a. barĉo
- b. bujabeso
- c. kareo
- ĉ. kuskuso
- d. pilafo
- e. tempuro
- f. halvao
- g. kumiso
- ĝ. mateo
- h. arako